Esperanto-Federacio de Langvedoko-Rusiljono

# SUDFRANCIA STELO

N-ro 212-213 · 2016 · 1-an kaj 2-an kvaronjarojn
http://esperanto-languedoc-roussillon.fr




SFS

**RÉABONNEMENT**

Pour recevoir la version papier, pensez à vous (ré)abonner au tarif de 10 €, tarif qui inclut la cotisation à la fédération, à envoyer à
Z. Mraihi le Watteau, app. 827
3 place Watteau
30900 Nîmes.

Pour recevoir dès parution la version numérique par internet : cotisation à la fédération de 2 €, à envoyer à martine.ragonnet@orange.fr.

**Envoyez vos idées, photos, articles, nouvelles… à**
Martine Ragonnet, appt 30
130 rue Adolphe-Alphand
34090 Montpellier
martine.ragonnet@orange.fr

Comité de relecture :
Josée Boccadifuoco,
Marie-Blanche Fondrillon,
Louis Ensuque,
Arnaud Lagrange.

## Enhavo

2 Compte rendu de la réunion fédérale du samedi 17 octobre 2015 à 10h, maison de la Vie associative de Béziers
3 Raporto pri la federacia kunveno, sabaton la 17-an de oktobro 2015 je la 10-a, domo de la asocia vivo, en Béziers
5 Zamenhofa tago en Montpellier
6 De Lozère
6 Post la atencoj
7 Studoj pri nocaj bestoj
7 Vojaĝo en Gvatemalo
9 Nacia kongreso de U.F.E. en Marsejlo
12 Malkovron de la naturo, de Kvinpetalo
12 Internacia Infana Kongreseto (I.I.K.) en Nitro, Slovakujo

# Compte rendu de la réunion fédérale du samedi 17 octobre 2015 à 10h, maison de la Vie associative de Béziers

*Ordre du jour*

1. Discussion sur l'association :
   Où en est-on pour la banque ?
   Amélioration des moyens de communications, etc.
2. Les actions à venir.
3. Un point sur le S.F.S.
4. Monique et Serge nous présentent une surprise.

*Personnes présentes.* Myriam Rivoire, Martine Ragonnet, Josée Boccadifuoco, Marie-Blanche Fondrillon, Geneviève Astier, Marithé Reguème, Line Maurel, Laurence Esclapez, Jean-François Passarella, Gilles Pérez.

*Personnes excusées.* Joëlle Cuq, Janine Bony, Colette Carbonnel, Loulou Da Ros, Ginette Devillier, Monique et Serge Eysseric, Monique et Francis Bernard.

Le point 4 est annulé, Serge et Monique étant malades

*1. Association*

Pour la gestion de l'association Gilles propose un logiciel plus simple. Et l'accès aux comptes en ligne (2 ou 3 semaines de délai).

Avec Martine, ils revoient la liste des adhérents et des contacts.

Par internet mais aussi avec une lettre papier pour une relance à tous les espérantistes connus de la région.

Trésorerie : Zohra n'a plus le temps de s'occuper de la trésorerie. Gilles prend le relais en attendant la prochaine A.G.

Voir aussi concrètement comment s'organisent les transactions avec Espéranto France (rétrocession, sur quel compte et à quel moment ?).

Faire l'inventaire de nos outils de communication. Qui veut s'en charger ?

Organisation de l'A.G. de printemps : peut-être sur 2 jours en Lozère, si Francis et Monique sont d'accord. Sinon voir avec Jorgos à Lafage ou à Sète... Qui veut participer au groupe de travail pour l'organisation ?

*2. Actions*

La région s'élargissant à Midi-Pyrénées, nous décidons de rester indépendants.

L'invitation d'un étranger comme nous l'avons fait pour Klera serait à renouveler. Qui a des contacts avec des bons espérantistes étrangers susceptibles de venir environ 3 semaines ?

Stage d'informatique entre nous, dirigé par Gilles, courant janvier : logiciel de gestion des associations.

*3. SFS*

À paraître en novembre. Les prochains : janvier, avril, juillet, octobre. Même prix : 8 € papier.

Les articles sont à envoyer à Martine : martine.ragonnet@orange.fr, adresse, 130 rue Alphand, appt 30, 34090 Montpellier.

Martine dispatche pour les corrections article par article : Arno, Marie-Blanche, Jeannine, Louis...

Gilles met en page au fur et à mesure des retours de correction.

*Divers*

Rappel : nous avons 2 expos à Béziers, elles peuvent circuler...

Manif occitane. Martine voit avec Marion (Espéranto Midi-Pyrénées) pour la participation au stand du samedi 24 octobre.

Le Congrès annuel d'Espéranto France aura lieu du 5 au 8 mai 2016 à Marseille.

Après le repas tiré du sac, nous avons pu regarder un court diaporama sur le Congrès universel.



## Raporto pri la federacia kunveno, sabaton la 17-an de oktobro 2015 je la 10-a, domo de la asocia vivo, en Béziers

*Tagordo*

1. Diskutado pri la Asocio
   - Kia situacio pri la banko ?
   - Pliboniĝo de la komunikaj rimedoj, k.t.p.
2. Venontaj agadoj
3. Interŝanĝo pri S.F.S.
4. Surprizo de Monique kaj Serge Eysseric

*Ĉeestantoj.* Myriam Rivoire, Martine Ragonnet, Josée Boccadifuoco, Marie-Blanche Fondrillon, Geneviève Astier, Marithé Réguème, Line Maurel, Laurence Esclapez, Jean-François Passarella, Gilles Pérez.

*Senkulpigitaj.* Joëlle, Jeannine Bony, Colette Carbonnel, Loulou Da Ros, Ginette Debillier, Monique kaj Serge Eysseric, Monique kaj Francis Bernard.

La kvara temo estas nuligita pro la malsano de Monique kaj Serge.

*1. Asocio*

Pri la administrado: Gilles proponas pli simplan programaron kaj interretan aliron al la banka konto (nur 2 aŭ 3 limtempaj semajnoj?).

Gilles kaj Martine ordigos la aliĝantan kaj kontaktulan listojn.

Paperletero estas sendota al ĉiuj samideanoj de la regiono .

Alvoko pri aliĝo, ĉu per interreta mesaĝo, ĉu per paperletero, estas sendota al ĉiuj konataj samideanoj de la regiono.

Pri la Financo. Zohra pro manko da tempo ne plu povas labori pri la financo. Gilles anstataŭas ŝin ĝis la venonta ĝenerala kunveno.

Vidu ni ankaŭ, kiel organiziĝos la interkonsento kun Esperanto France (kotiz-retransdono: kiam kaj sur kia konto?).

Inventari niajn komunikajn ilojn. Kiu bonvolas zorgi pri tio?

Organizi la printempan ĝeneralan kunvenon. Eble dum du tagoj en Lozère, se Monique kaj Francis konsentas. Se ne, peti tion de Jorgos en Lafage aŭ Sète. Kiu bonvolas partopreni en la gruplaboro por organizi ĝin?

S F S

### *2. Agadoj*

La regiono plivastiĝanta kun Midi-Pyrénées, ni decidas, ke ni restu sendependaj.

La akceptado de fremdulo kiel iam Klera estus refarenda. Ĉu iu havas kontaktojn kun spertaj fremdaj esperantistoj, kiuj konsentus viziti nin proksimume dum tri semajnoj?

Interreta staĝo pri programaro de la asocioj, gvidita de Gilles, dum januaro.

### *3. SFS*

Eldonota dum novembro. La sekvontaj dum januaro, aprilo, julio, oktobro. Ĉiam la sama prezo : 8 eŭroj.

La artikoloj estas sendendaj al Martine : martine.ragonnet@orange.fr, poŝtadreso: Appt 30, 130, rue Alphand, 34090 Montpellier.

Martine disdonos la artikolojn unuope, por korektado, al Arno, Marie-Blanche, Jeannine, Louis.

Gilles enpaĝigos la revuon, paĝon post paĝo, laŭ la revendato de la korektaĵoj.

### *Diversaj aferoj*

- Rediro : ni posedas en Béziers du ekspoziciojn, ili povas turni.
- Okcitana manifestado. Martine interkonsentas kun Mario (Espéranto Midi-Pyrénées) pri la partopreno en la budo, sabaton la 24-an de oktobro.
- La jara esperanta Kongreso de Espéranto France okazos de la 5-a ĝis la 8-a de majo 2016 en Marsejlo.

Post la manĝado, ni rigardis fotaron pri la UK de Lille.

# Zamenhofa tago en Montpellier

Lastan jaron ni festis tiun feston en Béziers, do ni provis, tiun jaron, fari kiel niaj biteranaj geamikoj, kiuj ĉiujn jarojn organizas agrablegajn momentojn!

Ni ĝojis retrovi niajn najbarojn en la ĉiesdomo Escoutaïre.

Matene, kantoj, teatraĵoj, ŝercoj, bildaro, kaj fotoj de nia UK en Lille, kaj poste ni kune manĝis. Kelkaj amikinoj, poste, vizitis la vintran bazaron.

Kiaj agrablaj momentoj!

Ĝis nia komuna printempa kunveno!











SFS



















## De Lozère

*par Francis BERNARD*

Bonjour,

Voici une petite anecdote :

Céline a parlé, au congrès à Lille, avec une Lituanienne qui lui a offert quelques petits livres. L'un d'eux s'intitule *Mi trafis* de Jinas BILIUNAS. Quelle ne fut pas notre surprise d'apprendre, en quatrième page, que ce petit livre a été édité grâce à l'aide financière de Marcelle MAURIN de Marvejols (Lozère) ! *« Eldono de la libro finansis Marcelle MAURIN el la urbo Marvejols Francio al kiu ni esprimas elkoran dankon ! »*

Le hasard nous a fait connaître Marcelle MAURIN : nous faisions des randonnées avec, entre autres, Claude MAURIN de notre commune. En voyant le mot *Esperanto* sur notre voiture, il nous a dit que sa tante était espérantiste et nous a donné son adresse. Nous sommes allés la voir mais elle était très âgée et presque aveugle ; elle nous a offert sa collection d'*El Popola Ĉinio* !...

C'était il y a plus de quinze ans !

S F S

## Post la atencoj

*de Line Maurel*

Blinde, abomenaj agoj mortigis sur nia planedo senkulpulojn, kiuj nur deziris pace vivi.

Fortege, ĉie ni devas aserti, ke, sola, Esperanto permesas diri: „interparolu unuj la aliajn“ kun respekto kaj amikeco reciprokaj.

Estas preferinde vorto al kuglo, fontoplumo al armilo, parolo al barbareco.

Inter la mortintoj tie ĉi kaj tie for, kiom da esperantistaj geamikoj, kiom da eblecaj esperantistoj?

Mi ĉiujn ploras kaj, ankoraŭ pli, tiuj esperantistoj, kiuj scias, ke, mortiginte unu homon, oni ekstermas la tutan homaron.

Per Esperanto, Zamenhof partoprenis al la mondokonstruado de ĝojo, amo kaj paco.

Ni daŭrigos lian laboron, eĉ se la vojo estas longa kaj malfacila.

## Studoj pri nocaj bestoj

*de Jean-Marie Lot*

La *pigo* estas birdo de la familio de Korvedoj, ĝi estas predantino de birdidoj kaj ovoj en la nestoj. Ĝi estas ĉasata pro tio. Ĝi estas klasita malutila.

Kiam oni mortigas ĝin, oni tranĉas la piedojn kaj sekigas ilin, poste la ĉasasocioj pagas 0,80 € por ĉiu piedparo de pigo.

*Celo :* havi ĉasadteritorion sen nocaj bestoj kaj provi plimultigi la ĉasaĵon.

La *vulpo* estas Mamulo, Karnovoro, kanisedo. Pro la disvastigiteco de la vulpoj, ili aperas en la popola kulturo kaj folkloro de multaj nacioj, triboj, kaj gentoj.

Tiu besto havas pintajn orelojn kaj longan voston.

La tekniko de la fumplenigado (oni fumplenigis la ternestojn, por ke la vulpo eliru eksteren) estas malpermesate.

La ĉasasocioj pagas 3,80 € por ĉiu vosto.

La *apro* estas sovaĝa porko, precipe, antaŭulo al la endomigita porko, kun kiu ĝi povas interfekundiĝi. La apro difektas la grundon fosante, kaj rikoltojn, precipe maizajn.


Por ĝin kontroli oni devas sin turni al la junuloj, ĉar la ĉaso al plenaĝuloj, kiuj regas la grupojn, kaŭzas disgrupiĝon kun pliaj difektoj al kultivoj kaj forta multnombriĝo.

Ĉasistoj ĉiujare mortigas multe da aproj; sen tiu ĉasado en Germanio la populacio en tiu lando dum du jaroj kreskus al tri milionoj da bestoj.



## Vojaĝo en Gvatemalo

*de Line*



Mi elektis Gvatemalon por mia jara vojaĝo. Kial? La bona epoko (20 °C–25 °C), vintro ŝajnas mallonga, mi plezure memoris pri Meksiko.

La tago de la foriro, frumatene mia amikino kaj mi retrovis la 18 personojn de la grupo.

La aviadila vojaĝo daŭris 17 horojn (2 en Madrido) Ĉe la aerodromo de Gvatemalurbo *(Ciudad de Guatemala)*, staris nia komforta buso, la gvidisto Miguel, la ŝoforo Abraham. Ekkomencis nia periplo (2 300 kilometrojn). Belaj, larĝaj vojoj, multaj veturiloj, kamionoj, malnovaj busoj, motocikloj, ĉaroj, ĉar ne ekzistas trajno .

Neniaj rondkrucigoj sed nombraj altegaj motorreguliloj.

Plurfoje ni haltis en vilaĝoj, promeninte tra eksterbazaroj. Virinoj sidantaj tere, vendis kokinojn, fiŝojn, legomojn, fruktojn, florojn. Viroj proponis bestojn (kaprinoj, ŝafoj...), diversajn objektojn



(telefono) ofte malnovajn. Maldikaj hundoj vagis inter la korboj. La virinoj surmetis brodajn, kolorajn regionajn vestarojn (jupo kaj senkolajn ĉemizojn kun mallongaj manikoj).

Ni haltis en pluraj urboj; preskaŭ ĉiutage ni aliiĝis en luksajn hotelojn. Mi multe ŝatas *Antigua* (3 noktoj). Strate ni marĉis sur rondaj ŝtonoj, kiuj doloris kaj masaĝis la piedplandojn (*rue caladée* franclingve). Sur la ĉefa placo staris la katedralo, kie nokte orkestro ludis funebran muzikon. Pro manko de mono oni ne riparis la ruinitajn preĝejojn, monakejojn. La seismo, la volkanaj erupcioj detruis ilin. Mi vizitis belegan hotelon (*Posadad de Dom Rodrigo*), kie loĝis antaŭe nobelo. De la florita terasa tegmento mi vidis volkanojn, kiuj ŝprucis fumon kaj lafofluon. Feliĉe nenia katastrofo okazis dum nia tuta restado.

Mi vizitis plurajn majaajn arkeologiajn lokojn: *Cobán*, *Ceibal*, *Tikal*, *Quiriguá Copán* (Honduro). Ekzotika, invadanta vegetalaro ĉirkaŭis ruinaĵojn (temploj), steleojn aŭ aliajn konstruaĵojn. La monstraj radikoj de la arboj (plurajn metrojn altaj) kiel voremaj serpentoj trairis la vojojn (sur aŭ sub tero) kaj ekaperis en la monumentoj, levinte la pezajn ŝtonojn. La ŝtato ne tre prizorgas la lokojn, la eksterlandaj oficejoj faras tion. Oni ofte parolis pri la laboro de la Universitato de Filadelfio. Se mi revenos post kelkaj jaroj, ĉu la seismoj, la volkano, la naturo ne detruis ilin?

Stranga impreso, ĉu la lando restos ĉiam kiel mi vidis ĝin?

Ni manĝis ĉe loĝanto (en *San José de Laguna*) laborinte kun kooperativo, kiu vendis la legomojn, la fruktojn, kiujn li kulturis. Li posedis du parcelojn malproksimajn de 2 kilometroj, kie li laboris mane, sen maŝino. La edzino faris teksaĵojn. Li manĝis kun ni (ni estis kvar), ne la edzino. Ni parolis per gestoj kaj kelkaj vortoj.

Miguel, nia gvidisto, posedis 9 parcelojn (el kiuj 5 hereditaj), veturilon, domon, 2 filinojn (ĝenerale po 4 infanoj en familio); li ricevis monon per turismo... Li estis riĉulo.

Tamen la indianoj estas la plej mizeruloj. La baza lernejo (ĝis 13 jaroj) estas deviga kaj senpaga, sed infanoj laboras por helpi familion... La knaboj ciras ŝuojn, la knabinoj vendas objektojn, teksaĵojn al turistoj. Ekzistas nur unu Ŝtatuniversitato senpaga.

Miguel asertis, ke Gvatemalo estas demokratio kun multe de koruptado. Do, la loĝantoj ne volas pagi siajn impostojn. Sur la aerodromo, la registaro fermis per kradoj la magazenojn, kies posedantoj ne pagis tiajn impostojn.

Gvatemalo estas katolika lando sed indianoj konservas ankoraŭ siajn majaajn kredojn. Ni vidis kuriozan ceremonion. Oni donis nutraĵon, alkoholon, monon al pajla manekeno *(Maximón)* ĉirkaŭita de katolikaj sanktuloj. Mi nenion donis nek demandis, do mi ne scias, ĉu *Maximón* estas efika.

Ni boatis sur la *Río Dulce* ĝis *Livingston*, en kie la loĝantoj estas nigraj. Ni alvenis ĝis la Kariba maro tre malpura. Ni vizitis plurajn interesajn muzeojn sen renkonti multnombrajn turistajn grupojn.

Mi kontentas pri mia vojaĝo. Tamen mi sentis ĝenon, kaŭze de la kontrasto inter miaj luksaj hoteloj, miaj bonaj vivkondiĉoj kaj la malriĉeco de la loĝantoj. Sed kiam mi trairis Parizon ĝis la stacidomo, mi vidis tendojn sur trotuaro de avenuo. Mizero ekzistas ĉie. Ĝis kiam? Ĉu ĝi malaperos iun tagon?

## Nacia kongreso de U.F.E. en Marsejlo

S F S




De la 5-a ĝis la 8-a de majo okazis la Kongreso de U.F.E. (Espéranto France).

Ni estis dek el nia langvedoka federacio, kiuj partoprenis tiun kongreson, el Béziers, Montpellier kaj Lozère, 100 el Francio (2 el Usono).

Ni kongresis apud la stacidomo, en *La Canopée*. Bela okazo por revidi geamikojn, kaj saluti ĉiujn deĵorantojn el la provencaj grupoj, kiuj faciligis nian partoprenon.

Dum tiuj 4 tagoj, laboro, komitato, ĝenerala asembleo kaj elekto de la nova teamo, debatoj pri la revuo (L.M.E.), niaj novaj eblecoj en la lernejoj, kaj malfacilaĵoj...

Kulturo: prelegoj, filmo, Jomo prelegis kaj kantis, Flavi deĵoris kaj dancis.

Ekskursoj: Marsejlo estas belega urbo! Ni vizitis la malnovan havenon, *le Panier, Notre-Dame-de-la-Garde...* la bluan marbordon kaj *Port-de-Bouc*.

Estis agrablega kongreso!

Dankon al tiuj, kiuj organizis kaj deĵoris.



*Fotoj de Thierry Spanyaard ꝁ Martine Ragonnet.*










S
F
S







ARTO







espéranto
France
La langue internationale équitable !









ESPERANTO


SAVON À L'HUILE D'OLIVE
FELIX EYDOUX
MARSEILLE

RUE
POIDS
DE LA FARINE




mi
estas



S
F
S






www.esperanto-france.org




## Malkovron de la naturo, de Kvinpetalo

La esperanta kulturcentro Kvinpetalo denove proponas al vi malkovron de la naturo en kaj apud Bouresse, en Puatuo (je trideko da kilometroj de Poitiers). La staĝo okazos ĉi-foje komence de la somero, de la 20-a ĝis la 24-a de junio.

Ni invitas vin promeni tra naturo kaj Vikipedio sub gvido de Alain FAVRE, elstara fakulo pri fungoj.

Tiu staĝo havos du aspektojn:

— Ni promenos en naturo kaj malkovros speciojn de vivuloj: plantoj, fungoj, bestoj, kaj ankaŭ interesajn mediojn.

— Ni verkos artikolojn por Vikipedio pri la sama temo, studante la jam ekzistantajn — kiujn eventuale oni ankaŭ provos plibonigi. Venu do bone ekipite – ŝue, vestaĵe, kaj se eble komputile.

Tiu staĝo taŭgas ankaŭ por prepariĝi al la faka branĉo „Sciencoj kaj Tekniko“ de la Atesto pri Kapableco de FEI.

Kvinpetalo Esperanto-Centro
4 rue du Bureau
86410 Bouresse
Retadreso: informoj@kvinpetalo.org
Telefono : (+ 33) (0)5 49 034 314.

S
F
S

## Internacia Infana Kongreseto (I.I.K.) en Nitro, Slovakujo

Ĝi okazos norde de Nitro, nur 4 km de UK-ejo, en veterinara lernejo kun granda tereno. Ni manĝos en granda salono kaj dormos en 2-3-litaj ĉambroj.

Gepatroj de junaj infanoj povas dormi kun siaj infanoj en la sama ĉambro kaj matene veturi per buso al UK-ejo.

Ni disponas pri pluraj lokoj por sporto kaj ludoj, ni povas prizorgi diversajn bestojn.

La nunaj prezoj estas 270 € por A-lando.

Grupoj, helpantoj kaj pluraj infanoj el sama familio havas rabaton de 15 %.

La skipon gvidas hungarino Veronika ACSÁDI, pri manlaboro zorgos belgino Nicky JANSSEN, venos koreino Ana Songĝanta 신은숙 SHIN Eun-sook por prepari la korean I.I.K.-on 2017.

Ni serĉas helpantojn, ekz. gesportemulojn (gesportinstruistojn), gevartistojn kaj ĉiun, kiu ŝatas infanojn.

Por kontakto skribu rekte al: infana.kongreseto@gmail.com.
Vizitu la ĉefan paĝon de I.I.K. kun informoj, prezoj...
http://bertosch.free.fr/iik2016/